

Pri la infanlibro Vulpoj de Ĉironnup
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 473, 1981.04.23 & 25

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Hodiaŭ ni volas paroli al vi pri tre bela infanlibro, kiun verkis kaj mem ilustris la japano Takahasi Hiroyuki kaj esperantigis Niwa Masahisa. Bilde, tekste kaj ankaŭ per siaj aldonaj klarigoj, tiu ĉi kvindekpaĝa, fortike bindita kaj sufiĉe grandformata libro estas ege altira.

A.- Postparole la verkinto tiel rakontas la kaŭzon de la libro. Ni citas:

Cl.- "Vortoj de la verkinto al estimataj gepatroj.

"Mia kolero nenien turnebla ! Estis ĉirkaŭ la fino de la jaro 1944, kiam mi surteriĝis sur la insulon O.Urup (en mia rakonto Ĉironnup, vulpo en aĝa lingvo), unu el Kurilaj Insuloj.

"Tiamtempe la Pacifika Milito pli kaj pli furioziĝis.

"Vivis tie multaj vulpoj.

"Trovinte min surteriĝinta, mezaĝaj geedzoj, kiuj loĝis en gardkabano, ekiris al sia enlanda hejmo, lasinte tiujn vortojn: Amu la vulpojn, ni petas.

"Sed tamen, en printempo, kiam ekfloris vulp-primoloj, mi trovis multajn kaptilojn kaŝe metitaj de kontraŭleĝa ĉasisto tie kaj tie en la insulo.

"Kaj ĉe unu el la kaptiloj kuŝis eta skeleto de vulpido.

"Apud ĝi estis disĵetitaj ankaŭ sennombraj ostetoj ŝajne de ratoj kaj birdoj.

"Min impresis Knabina Ĵizo staranta sola sur la proksima monteto

A.- Noto en la libro klarigas, ke **Knabina Ĵizo** estas statuo el Ŝtono servanta al budhismaj ritoj. Ĵizo estas japana nomo de bodisatvo, kiu de la malnova tempo estis vaste adorata en Japanujo kiel la Budista gardanto de farmistoj kaj infanoj. Tiuj statuoj estas troveblaj precipe en vilaĝoj kaj sur kampvojoj. Kelkaj estas ŝirmitaj en tegmentita kabaneto kaj aliaj elmetataj al la suno kaj pluvo. En la koncerna infanlibro titolita **Vulpoj de Ĉironnup** la statuo reprezentas knabineton.

Cl.- Takahasi Hiroyuki en sia postparolo do diras: "Min impresis Knabina Ĵizo staranta sola sur la proksima monteto.

"Kaj mi neniam povas forgesi, ke en mia juneca koro tiam ekbolis kolero nenien turnebla.

"Tia emocio instigis min verki tiun ĉi rakonton, "Vulpoj de Ĉironnup".

"Tamen mi aldonas, ke tiu ĉi rakonto mem ne estas reala fakto, sed ĝisfunde mia originalaĵo.

"Lastatempe oni senĉese diskutas pri la problemo de medio, laŭte krias pri la ŝirmado de pereontaj naturo kaj bestoj.

"Estus por mi plej granda ĝojo, se infanaj legantoj ĉerpas el tiu ĉi rakonto ne nur fortecon de amo inter gepatroj kaj infanoj, sed ankaŭ ion pli profundan kaj grandan."

A.- La rezulto de tiu kolero nenien turnebla de Takahasi Hiroyuki estas fakte poeziplena libro, kies bildoj kaj rakonto nin transportas en pereantan mondon. Kaj tiu tristeco estas ne nur emociiga por la infanaj legantoj, sed ankaŭ por la plenkreskulaj, al kiuj la aŭtoro tutcerte ankaŭ mesaĝas per sia novelo. Ĉar fakte la tuto estas pli pribesta novelo, ol infanlibro. Kaj la tradukinto siavice rakontas, kiel li malkovris tiun ĉi neordinaran novelon. Ni citas:

C1.- "La originalan bildlibron mi hazarde trovis en iu librejo. Ambaŭ, la bela rakonto kaj la senornamaj bildoj desegnitaj de la aŭtoro mem, kortuŝis min.

"Mi decidis esperantigi ĝin por ke esperantistaj gepatroj kaj infanoj de la tuta mondo povu tuŝi la signifoplenan enhavon kaj la belajn bildojn.

"La verkinto S-ro Takahasi volonte permesis min tion fari, kaj prezentis mian intencon al la eldonejo Kin-no-Hosi-Sya, kiu helpis min aperigi esperantan eldonon.

"Mi esprimas mian koran dankon al iliaj bonvoloj.

"Mi sentas min tre feliĉa pro tio, ke mi povis publikigi la etan tradukaĵon okaze de Internacia Jaro de la Infano. Niwa Masahisa»

A.- La libro **Vulpoj de Ĉironnup** estas do unu el la belaj fruktoj de la Internacia Jaro de la Infano. Se ni raportas pri ĝi du jarojn tro malfrue, tio ne estas nia kulpo. Nur antaŭ kelkaj tagoj tiu ĉi libro fine atingis nin en Svislando. Estas, ke en Esperantujo, ĉio disvolviĝas ege malrapide, eĉ la lanĉado de poeziplena infanlibro. Simpatia originalaĵo de la libro estas la biografiaj notoj pri la verkinto kaj pri la tradukinto. Jen pri la verkinto Takahasi Hiroyuki:

Cl.- "En 1923 naskiĝis en prefektujo Akita.

"Eksredaktoro de Librejo Komine.

"Nuntempe verkisto kaj direktisto de bildlibroj, kaj prezidas "Hati Pro", idean centron pri bildolibroj. Membro de Asocio de Japanaj Porinfanaj Literaturistoj.

"Projektado, farado kaj bindado de bildlibroj krom multaj originalaj verkoj kun bildoj.

"Loĝejo: Kitabara en Tanasi apud Tokio."

A.- Tia informo, kiu finiĝas eĉ kun indiko de la adreso de la verkinto estas en si mem ege simpatia. Kiom da rektaj kontaktoj povus kreiĝi inter la legantoj kaj la aŭtoroj de la libroj, se tio estus regula farmaniero. La noto pri la tradukinto Niwa Masahisa ankaŭ donas la eblecon skribi al li, kaj tion ĉi ni certe faros. Jen kion tiu noto diras pri tiu esperantiginto de vera juvelo:

Cl.- "En 1913 naskiĝis en Nagoya. Emerito (eicsurboficisto de Nagoya). Esperantiĝis en 1933. Vicdelegito de UEA en Nagoya, Konsilanto de Japana Esperanto-Instituto. Loĝejo: Gokuraku en Nagoya."

A.- Kaj nun ni laŭtleĝu parton de la teksto de **Vulpoj de Ĉironnup**. Tiel komenciĝas la rakonto:

Cl.- "Estas sur la norda maro insuleto nomata Ĉironnup.

"En printempo, kiam ekfloras vulp-primoloj, venis ĉi tien avo kaj avino kiel kutime.

"Tio okazis en la jaro, kiam pli kaj pli furioziĝis la milito.

A.- "Ĉesis longedaŭra neĝado, kaj alfluis glaciblokoj plene ĉirkaŭ la insuleto.

"Naskiĝis du vulpidoj en kaverno situanta profunde en betularbaro.

"Ja viveca estas la vulpa etulo. Li paŝas eksteren ŝanceliĝante.

"Ja dorlotita estas la vulpa etulino. Ŝi jam longe ne forlasas la mamon de sia panjo."

Cl.- Simplaĵ frazoj, tre belaj portretoj de vulpoj en nordaj pejzaĝoj, kaj pli kaj pli tragika vivo por la vulpoj, ĝis kiam nur la vulp-primoloj grupe florantaj memorigas pri la pereintoj, viktimoj de soldatoj.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Glaude kaj Andrée Gacond recenzis la infanlibron **Vulpoj de Ĉironnup**. Ĝis reaŭdo !